


L[★]umo 

KVaK!*



*Kanada Virtuala Kongreso!

De la redakcio

Karaj legantoj,

La koronviroza pandemio skuis la mondon kaj plene transformis la Esperantujojn. Ni en Kanado estis aparte tuŝitaj pro la pandemio pro unu simpla kialo: la jaro 2020 estis la jaro, kiam devis okazi nia kanada, Montreala UK, kiu devis esti prokrastita ĝis 2022. Dum tiu lasta jaro ni jam alkutimiĝis al multaj aferoj, kiuj estis por ni novaj antaŭ jaro — kiel kunveni virtuale kun samurbanoj kaj amikoj. Mi pensas, ke multaj el tiuj ŝanĝoj fariĝos la nova realo — la realo pli virtuala kaj eĉ pli konektita. Kiu scias — eble la koronviroza pandemio, finfine, rezultos en pli granda nombro de esperantistoj ol antaŭpandemie?

Sur la paĝoj de tiu ĉi numero vi vidos multajn ekzemplojn de tiu ĉi transformiĝo kaj “virtualiĝo” de Esperantujo tutmonde kaj kanade. Interalie, ni okazigis la unuan Kanadan Virtuala Kongreson (KVak) kaj la unuan tut-kanadan Zamenhof-feston. Mi trovis la ambaŭ eventoj tre ĝuindaj kaj mi esperas ke ili ripetiĝos, eĉ postpandemie!

Ne maltrafu la okazon verki kadre de INK —

Interkultura Novelo-Konkurso — jen alia bela iniciato, kiu naskiĝis pro la pandemio. La temo estas “KOVIM-19: kiel ĝi ŝanĝis nin”.

Kio do pri la Montreala UK en 2022? Eble, la plej granda demando estas kia estos la UK en la postpandemia tempo. Ĉu oni postulos “vakcin-atestilon” por vojaĝi? Kiom da homoj ĉeestos? Ĉu la kongresoj mem aspektos malsame ol antaŭe? Ĉu la virtuala parto daŭre estos la parto de ĉiuj UK-oj? Ĉu la homoj en la postpandemia tempo emos vojaĝi pli — aŭ malpli ol antaŭe? Kia estos la monda ekonomio? Kia estos la ekonomio en nia plej proksima najbaro

— Usono — de kie ni atendas la plejparton de la partoprenantoj? Mi timas ke mi ne povas respondi ĉiujn ĉi demandojn — nur la tempo montros. Mi tamen povas diri al vi unu aferon kun certeco — la sukceso de la montreala UK ankaŭ multe dependas de la forto de la E-Movado en Kanado. Do, kunvenu kaj kongresu virtuale, volontulu, subtenu unu la aliajn simple kiel amikoj — tiel, kune kaj forte, ni realigos la unuan kaj (espereble) plene postpandemian UK-on!



INK: “KOVIM-19, kiel ĝi ŝanĝis nin?”

Jen plia bela projekto el Kebekio: Internacia Novelo-Konkurso. Ĝin iniciatis unu el la montrealaj aktivuloj + la montreala LKK. Akademio Literatura de Esperanto (ALE) estas la ĉeforganizanto, kaj UEA — aŭspicianto. Diversaj temoj estis proponitaj, kaj reta voĉdonado faris la elekton por la konkurso (la temon “KOVIM-19: kiel ĝi ŝanĝis nin” proponis Ĵenja Amis). Por diskonigi la konkurson tiom vaste kiel eble, la organiza teamo organizis virtualan eventon, kun gravaj gastoj — sciencistoj kaj specialistoj pri la pandemio. Tiu evento fariĝis la plej granda virtuala evento de Esperantujo en 2021 ĝis nun, kaj tre rapide fariĝis unu el la plej popularaj videoj en la YouTube-kanalo de UEA: UEAViva. Jen artikolo el la revuo Esperanto (aprilo 2021), kun ŝanĝetoj — Red.

La 13-an de marto 2021 virtuale, uzante la platformon Zoom, kun paralela realtempa elsendo pere de la YouTube-kanalo UEAViva, okazis la diskutrondo “KOVIM-19, kiel ĝi ŝanĝis nin?”. Ĝi estis aranĝita okaze de la Interkultura Novelo-Konkurso (INK). Sekvis ĝin centoj da esperantistoj el multaj landoj. Laŭ la takso de YouTube, ĝi havas ĉ. 1200 spektantojn, do tio donas la certecon, ke en la eventon estis engaĝitaj sume signife pli ol mil

homoj, se kalkuli ĉiujn retejojn kaj republikigojn en ili.



Laŭ la plano de la organizantoj devis okazi diskuto pri la pandemio kaj ĝia influo en nia tutmonda socio, de la scienca kaj persona vidpunktoj. Kaj tiu plano, laŭ ni, sukcese realiĝis.

Enkondukis la aranĝon Nicola Ruggiero (ALE), sekretario de INK. Li prezentis la ĉefpartoprenantojn de la aranĝo – la sciencistojn José Antonio Vergara, Margaret

Zaleski-Zamenhof kaj Amri Wandel. Sekvis la parolado de Amri Wandel. Ekde la komenco li konstatis, ke la nuntempaj ŝanĝoj en la mondo influis Esperanto-aranĝojn, tiel ke ili nun amase okazas virtuale. Li ankaŭ menciis, ke ne malgravan kontribuon faris por sukcesigo de tiaj aranĝoj Irana Esperanto-Asocio (kiu i.a. teknike okazigis ankaŭ tiun ĉi kunvenon, uzante sian Zoom-konton, helpe de Luis Obando, kiu vivelsendis al YouTube).


Wandel komunikis, ke tio ne estas la unua diskuto pri la nuna temo. Ankaŭ ĉirkaŭ unu jaron antaŭe okazis, ekzemple, la intervjuoj fare de Katalin Kováts kun li, Vergara kaj Zaleski-Zamenhof. Ili estas spekteblaj ĉe YouTube.

Simbola afero estas ankaŭ tio, ke ĝuste unu jaron antaŭe, marte de 2020, Monda Organizo pri Sano (MOS) oficiale proklamis la komencon de

pandemio de KOVIM-19 — ĝuste pro tio la organizantoj volis okazigi la eventon la 13-an de marto.

Wandel rakontis pri la situacio, kiun trafis la Estraro de UEA kaj LKK de la Montreala UK, komence de la sankrizo, kaj la malfacilaj obstakloj, kiujn ili devis alfronti, kaj pri la alprenitaj decidoj. Li emfazis, ke malgraŭ ĉio la Virtuala Kongreso kaj MondaFest' en 2020 estis ege sukcesaj kaj ke estas aktivaj preparoj por la dua Virtuala Kongreso, kiu i.a. povas okazi ankaŭ paralele kun la ĉeesta UK ne nur ĉi-

jare, sed ankaŭ estontece. “Venko de Esperantujo super la pandemio” – jen estas la ĉefa slogana resumo, formulita de Wandel, rilate la rezultojn de MondaFest' kaj aliaj sukcesoj de esperantistoj pasintjare.





En la sekva parto de la prelego Wandel prezentis la evoluon kaj aktualajn pandemiajn statistikojn, bazitajn sur la informoj el la retejoj de la John Hopkins-Universitato (JHU) kaj “Our World in Data” (Nia mondo per datumoj). Dum la lasta parto de la prelego li rakontis pri la graveco de la vakcinoj kontraŭ la koronaviruso en Israelo, kie la vakcinado nuntempe progresas plej rapide, kaj la tuta mondo, la teorion de la funkciado de la novaj koronavirusaj vakcinoj kaj kial laŭ lia opinio ili sukcesis esti inventitaj kaj ekproduktataj tiom rapide.

La sekva preleganto estis José Antonio Vergara, fakulo pri la temo, estante kuracisto pri epidemiologio kaj universitata instruisto. En la komenco de la parolo li esprimis sian opinion pri

la titolo de la panelo kaj la konkurso. Laŭ lia opinio, pri kiu li “estas firme konvinkita, la pandemio tute ne ŝanĝis nin, sed ĝi frape memorigis nin pri tio, kio ni estas kaj kiaj ni estas”. Li emfazis, ke homo estas dense ligita al la biosfero kaj naturmedio, kaj la nuna situacio nur pli evidente elmontris tion. Tio estas la kerna fenomeno, kiu trafis ĉiujn, la tutan mondon, sendepende de la mondoparto, lando. Laŭ la opinio de Vergara la viruso venis al homoj por memorigi pri tio, ke ili ne estas izolitaj kaj estas interdependaj unu de la alia – pri tio oni forgesis dum la lastaj jardekoj. Li konstatis, ke la pandemio venigis multajn malcertecojn en la homa vivo: ĉu oni malsaniĝos, ĉu oni mortos? Virusoj transiras de unu homo al la alia pro la interpersonaj kontaktoj; ne ekzistas izolitaj socioj.

Vergara konstatis, ke diversaj landoj havas tute diversajn eblojn pri kuracado de la malsanaj homoj, kaj estis absolute malsamaj aliroj kaj reagoj al la problemo de la registaroj, sansistemoj k.a. tra la mondo. Krome aliroj al la problemo montris enorman kaj grandegan diversecon de la kulturoj, ekzemple, rilato al la limigo de la interpersona interagado, al la moviĝo, la devigaj limigoj, al la elementoj de la ĉiutaga vivo. Tiel la

reago al la izoliĝo de diversaj kulturoj estis tute malsama – “... Por iuj homoj tiu limigo al la rajto kunsidi, kunveni kaj eĉ tuŝi unu la alian, estis pli sentebla. Tiu deviga izoliĝo en la hejmoj estis pli dolora... pli nervoziga por iuj kulturoj, ol por la aliaj...”

Vergara konsentis kun Wandel pri la graveco de la vakcino kaj la mirinda rapideco de ĝia apero, kio ŝuldiĝas “al la graveco de la scienco, kiel homa atingo”, kaj emfazis, ke la scienca scio gravas kaj ekzistas grava problemo de la kontraŭscienca agado aŭ simpla manko de sciencaj konoj inter la homoj. Vergara finis la prelegeton per la averto, ke venos novaj pandemioj kaj la homaro devas esti preparita al tio, kaj ke oni strebu vivi en pli ekologiaj manieroj, kaj pli homecaj rilatoj.

Margaret Zaleski-Zamenhof, kuracisto, la pranepino de L.L. Zamenhof, komencis sian paroladon per la konstato, ke Wandel kaj Vergara jam sufiĉe multe parolis pri la temo kaj ŝi volas nur aldoni proprajn rimarkojn pri la nuna situacio. Ŝi konstatis, ke la homoj “devas konsciiĝi pri la vivmaniero, kiu influas la sanon en la mondo” kaj komunikis, ke laŭ la difino de la Monda Organizo pri Sano (MOS) la termino “sano” temas ne nur

pri la fizika sano, sed ankaŭ pri la sociala, psika kaj aliaj aspektoj.

Zaleski-Zamenhof konstatis, ke ŝia unua reago, kiam la pandemio komenciĝis, estis ke kvazaŭ realiĝas la scenaro de iu nekredebla sciencfikcia filmo aŭ libro, en kiu ŝi spektas la okazaĵojn, kiel kuracisto, terurajn situaciojn, kiam la homoj malsanis kaj mortis en nia reala vivo. Ŝi samopinias kun Vergara, ke la pandemio ne ŝanĝis la homojn, sed estas la okazo por konsciiĝi pri tio, “ke ni subite malkovras, ke ĉiutagaj aferoj, nia vivstilo, niaj tre simplaj plezuroj, tute ne estas tio, pri kio oni povas pensi, ke ni ĉion ĉiam havos” – vojaĝi, viziti muzeojn, teatrojn, renkontiĝi kun la amikoj, studi ktp. Zaleski-Zamenhof opinias, ke nun tre gravas taksu la socialajn problemojn.



Komentante la vortojn de Vergara pri tio, ke la pandemio povas esti la okazo por pliproksimigi la familianojn, ŝi emfazis, ke ne ĉiam ĉio iras glate, ĉar okazas multaj psikologiaj, psikaj kaj aliaj problemoj; estas konata fakto, ke draste kreskis kazoj de perfortoj ene de la familioj.

Inter la pozitivaj momentoj en la nuna situacio ŝi opinias, ke la homoj kapablas adaptiĝi kaj krome homoj kapablas agi kune por superi la problemojn. Laŭ Zaleski-Zamenhof esperantistoj multon lernis dum la pandemio kaj montris, ke ili povas kuniĝi malgraŭ la distancoj, uzante la modernajn rimedojn. Ŝi tre ĝojas, ke dank' al tio naskiĝis novaj esperantistoj, kiuj lernis Esperanton interrete, kaj ŝi petis Katalin Kováts rakonti pri tio, kiu progreso okazis tiurilate.


Katalin Kováts parolis pri la pozitivaj flankoj, kiujn la pandemio portas. Ŝi konstatis, ke la Esperanto-

komunumo plifortiĝis, ekstreme kreskis la nombro de kursoj, multe pli efike kunlaboris diversaj Esperantaj asocioj, instruistoj kunigis siajn

lernantojn ktp. Kreskis ankaŭ la ebloj, kiujn nia komunumo jam havis, sed antaŭe ne tiom aktive uzis. Ŝi opinias, ke tiuj ĉi rimedoj, kiuj ebligas virtualajn lernadon kaj instruadon, devas resti kaj esti utiligataj, eĉ kiam la pandemio finiĝos, ilin eblas kombini kun la tradiciaj ĉeestaj kursoj.

Nicola Ruggiero rakontis pri INK, montrante ĝian retejon kaj transdonis la vorton al François Lorrain (Montrealo, Kanado), la prezidanto de INK. François diris, ke li akceptis la prezidantecon de la konkurso, ĉar ĝi kuraĝigas al verkado en

Esperanto. Laŭ li verkado en Esperanto estas “unu el la ĉefaj vojoj, per kiuj oni povas plibonigi, polurisman regadon de la lingvo”. Poste Paulo Sergio Viana (Brazilo) legis tre emocian novelon, la temo de kiu estis la pandemio.



Sekvis monro de la [antaŭfilmita prezento de Claudia Larochelle, Honora Prezidanto de INK \(Kebekio, Kanado\)](#). La filmeto aperas en la franca kun subtekstoj en Esperanto. La ĉefa parto de la aranĝo finiĝis per intervjuetoj, kiujn faris Nicola Ruggiero kun du esperantistinoj, kiuj lernis Esperanton dum la pandemia tempo – Chelsea Moses kaj Marisol Soriano. Chelsea loĝas en Usono. Ŝi komencis lerni Esperanton julie de 2020. Laŭ ŝi, en Usono ne multaj homoj parolas iujn aliajn lingvojn, krom la gepatra, kaj por ŝi estas tre interesa afero, ke ŝi nun povas paroli Esperanton, konsiderante tion, ke ŝi neniam partoprenis ĉeestajn Esperanto-renkontiĝojn. Nun Chelsea evoluigas propran blogon en Esperanto ĉe YouTube.

Marisol loĝas en la suda parto de Hispanio kaj instruas en universitato. Ŝi sciis pri Esperanto longan tempon, sed eklernis ĝin nur dum la pandemio. Vi povas legi intervjuon kun ŝi en la revuo Esperanto (n-ro 9, 2020). La ĉeestantoj aktive partoprenis la diskuton, starigis multajn demandojn, faris multajn komentojn. La kunveno estis registrita. Vi povas spekti ĝin en la jutuba kanalo UEAViva: <https://mallonge.net/bv>.

Dima Ŝevĉenko, Anna Striganova

Pli pri INK!

La limdato por sendi verkojn al INK estas la 20-a de junio 2021, kaj la gajnintoj estos anoncitaj dum la 107-a UK en Montrealo, en 2022.

Premioj por la gajnintoj estos 500, 300 kaj 200 eŭroj. Notu la foto-bildo-konkurson, kadre de INK, kun la premio de 150 eŭroj.

La lanĉo de INK (<https://mallonge.net/bu>) okazis la 20-an de septembro 2020, dum la Printempa Inaŭguro de la Monda Festivalo de Esperanto (Mondafest' 2020): ĝin enkondukis Nicola Ruggiero nome de ALE, Orlando Raola nome de UEA kaj José Antonio Vergara kiel speciala gasto, kiu prezentis la vidpunkton de epidemiologo.

Anoj de la ĵurio venas el diversaj kontinentoj kaj taksos la novelojn rete.

Aŭtoroj povas sendi novelojn verkitajn originale en Esperanto aŭ verkitajn en iu ajn alia lingvo, kun traduko al Esperanto. Tial INK estas malfermita al ĉiuj aŭtoroj en la mondo kaj estas okazo konigi Esperanton kaj Esperantan literaturon al la ĝenerala publiko. Pliaj detaloj pri la konkurso: <https://www.akademio-literatura.org/ink>.

Kion ni lernis antaŭ- kaj post-KVaKe?

Ene de nur kelkaj monatoj de la pandemio Esperantujo ŝanĝiĝis pli multe ol en la lastaj jardekoj. Eventa Servo furoras, landoj kaj grupoj kongresas virtuale, aperas talentegaj novuloj, kiuj lernis Esperanton pro la pandemio, la UK-on 2020 anstataŭis la Virtuala Kongreso, kaj eĉ estiĝis nova vorto: kolibro (persono, kiu ŝatas “gustumi” virtualajn E-eventojn).

Sed kio pri KEA? Ĉu tradicia Esperanta membro-organizo, kiel KEA, povas vigliĝi, moderniĝi kaj virtualiĝi, eĉ se la cirkonstancoj puŝis la montrealan UK-on al 2022? Ĉu, efektive, tiu prokrasto povus eĉ doni al ni la eblon kreskigi la Movadon, interkonatigi la kanadajn esperantistojn kaj prepari la grundon por eĉ pli bona UK post unu jaro? Ĉu ankaŭ ni povus okazigi la unuan tutkanadan kongreson virtuale (la ĉeestaj tutkanadaj kongresoj, laŭ mia kompreno, okazis en la tempo longe antaŭ ol mi enmigris en Kanadon, sed lastatempe Kanado ne havis


propran kongreson). Ĉu eble ni povas esti eĉ pli pretaj kaj pli aktivaj por la jaro 2022? Mi pensas, ke jes, kaj ekzakte tio estis la ideo malantaŭ la organizo de la unua Virtuala Kongreso de Kanada Esperanto-Asocio (kiun Bob Williamson, la sekretario de KEA, tiom trafe kaj ĉarme, nomis « KVaK »). Mi ege esperas, ke tiu evento kreas bonan energion ĉe ĉiuj esperantistoj en Kanado, tiel ke ni eniros en 2022 kun pli da fortoj, ideoj kaj

entuziasmo, kaj pretaj labori por la plej granda evento de Esperantujo en 2022!

La KEA-estraro decidis KVaKi novembre, ĉar la somero estis plena je aliaj virtualaj eventoj. Antaŭ la kongreso mi volis fari enketilon por lerni pri la preferoj pri la evento mem, sed ankaŭ iom

lerni pri esperantistoj en Kanado ĝenerale. Ni ricevis la respondojn de 60+ homoj antaŭ-KVaKe kaj 40+ post-KVaKe (la granda plejparto, anoj de KEA, de preskaŭ ĉiuj provincoj kaj unu teritorio) kaj mi feliĉe dividas kun vi la rezultojn de tiuj ĉi enketiloj.

Via aĝo
62 responses




Junuloj, aktiviĝu!

Ne estas granda surprizo, ke la anoj de KEA estas plejparte pli aĝaj — pli ol 30% estas en la kategorio de 65 jaroj aŭ pli. La dua kaj la tria plej grandaj kategorioj konsistas el 51–64-jaruloj (27%) kaj 35–50-jaruloj (26%). Estas 16% de la homoj, kiuj aĝas je 35 jaroj aŭ malpli. Estas klare, ke KEA devas varbi junulojn kaj doni al junuloj voĉon kaj spacon en la gvidaj roloj kaj... jes, por trovi la junulojn, ni devas aktivi virtuale!

Kanadaj esperantistoj aktivas!

Preskaŭ du trionoj de la respondintoj diris, ke ili aktive uzas Esperanton — ekz., korespondante, kaj partoprenante en kunvenoj, virtualaj kaj ĉeestaj. Kvarono de la respondintoj uzas Esperanton de tempo al tempo. Mi pensas, ke tio estas vere bona novaĵo, ĉar tio signifas, ke ni havas jam bonan kvanton da pretaj aktivuloj kaj potencialaj volontuloj por Montrealo-2022 (45% cetere respondis, ke ili planas ĉeesti kaj volontuli, dum

Kiom multe vi uzas Esperanton?
62 responses



20% planas nur ĉeesti) — multaj ne povis respondi en la cirkonstancoj, kio ja tute kompreneblas!

Lumo: elektronika, malferma al ĉiuj!

Ni ankaŭ faris kelkajn demandojn pri *Lumo*, la revuo de KEA. La bona novaĵo estas, ke preskaŭ triono regule legas ĝin, kaj preskaŭ 40% el la respondintoj trarigardas artikolojn, kiuj interesas ilin — do, estas bele, ke la homoj aprezas la laboron de la redaktoro! En la post-KVaKa enketilo la plejparto indikis elektronikan revuon kiel unuan



preferon (sekvatan de papera revuo ; retejo estis tria prefero). Du trionoj ankaŭ volas vidi *Lumo*-n malfermita al ĉiuj — do, ne nur al anoj de KEA, kiel estis ĝis nun.


Kunlabori... ne elbruliĝi

Ĉirkaŭ kvarono de la respondintoj respondis, ke ili pretas volontuli en la kampo, kiu interesas ilin aŭ eĉ esti en la estraro, alia kvarono ne havas sufiĉe da informoj por decidi, ĉu ili ŝatus volontuli Esperante aŭ ne. La ceteraj 50% ne pretas labori aŭ pro tempomanko, aŭ simple ĉar aktivi

Esperante ne interesas ilin. Laŭ mi, tiuj rezultoj ne estas surprizaj — estas konata fakto, ke en Esperantujo ĝenerale (ne nur en Kanado), kaj en volontulaj organizoj ĝenerale, la plejparton de la laboro faras tre malgranda kvanto da homoj. Interese, ke ĝuste pri tiu punkto parolis Katalin Kováts en unu el la prelegoj de KVaK. Do, jen alia granda tasko por la gvidantoj de KEA — certigi la daŭripovon de la movado kaj eviti la elbruliĝon de la nunaj volontuloj. Tio, eble, estas la plej malfacila tasko por la estraro — certigi la daŭripovon kaj kontinuan de la Movado, sen elbruligi la nunajn ĉionfarantojn. Laŭ mi, en similaj virtualaj kongresoj, informado kaj interkonatiĝoj inter homoj estas esencaj tiurilate!

Ĉu vi legas la revuon Lumo (lastatempe kombinita kun La Riverego de ESK)?

60 responses



Mi pensas, ke la plej granda tasko estas enigi en la estraron la laboremulojn – la homojn, kiuj jam multe aktivas en Esperanto.

Kreskigo de la movado, preparoj por UK

En la post-KVaK-a enketilo ni demandis pri tio, kiuj estu la prioritatoj de la estraro. Sur la unua loko estis la kreskigo de la movado kaj la preparoj por la UK-2022 (dua loko), sekvate de komunikado kaj la kunvenoj (ambaŭ sur la tria loko) kaj la eldonado (libroj, *Lumo*).


Preskaŭ 90% taksis la organizon de KVaK alte aŭ altege kaj indikis, ke ili volas daŭre KVaKi! :) El inter la sugestoj por plibonigo estis aldoni pli da kanada enhavo. El inter la programeroj la plej ŝatata evidentiĝis simple libera babilado inter partoprenantoj, sekvata de la prelegoj de eminentuloj. Sed ankaŭ ĉiuj aliaj prelegeroj ricevis altan pritakson. Mi pensas, ke aparte laŭdinda estis la laboro de la KVaK-organiza kaj teknika teamo, kun apartaj laŭdoj al Bob Williamson (kunordiganto) kaj Andy Blair (teknikisto). Dankon al ĉiuj, kiuj kontribuis — brave farite!

Ĵenja Amis

Unua tut-Kanada Zamenhof-festo!

La ideo okazigi tutkanadan Zamenhof-feston venis al mi tute spontane, babilante kun amikoj en unu el la babilĉambroj dum KvaK – mi pensis, ke la homoj ĝuos plian okazon esti kune, kaj virtuala tutkanada Zamenhof-festo ŝajne estis perfekta okazo por tio (kaj dum-KVaKe iom mankis tempo por libera babilado). La homoj en la babilĉambro tuj subtenis la ideon – kaj ankaŭ la du trionoj de la respondintoj al la post-KVaK-a enketilo diris la samon! Mi ankaŭ sentis, ke, se ni ne faros tion ĉi-jare, ni eble maltrafos tiun eblon entute — ĉar mi (kaj, mi supozas, ĉiuj aliaj!) revenos al la ĉeestaj Zamenhof-tagaj festadoj, en niaj lokaj grupoj.

En la enketilo mi ankaŭ petis ideojn por la festo kaj kontribuojn al la programo— kaj tiuj ja venis! Estis Andy Blair, kiu havis la absolute brilan ideon porti la kostumojn de la Zamenhofa tempo (mi ĝoje trovis bluzon kaj jupon, kiuj aspektis kiel io de la 19-a jarcento, portis la harojn supre, kaj ŝajne ĉiuj aliaj ankaŭ ĝuegis vestiĝi laŭ la epoko!). Guy kaj Merle Matte proponis fari



Normand Fleury: 1-a premio!

Zamenhofan kuntostadon, Zdravka Metz sugestis fari Zamenhof-teman kvizon, kaj Gene Keyes sugestis montri julan karolaron (kaj kelkaj homoj indikis, ke ili ŝatus Esperantan karaokeon). Ni ankaŭ skribis al Joëlle Rabu kaj Nico Rhodes por peti artan kontribuon – kaj ili tuj bonkore jesis, eĉ se ne estis multe da tempo por prepari!

Ni dividis la feston en tri partojn: prelegoj, arto kaj amuziĝoj. Malsame ol KVaK, la prelegoj estis tre mallongaj kaj iom ludecaj. Wally du Temple, la honora prezidanto de la montreala LKK, parolis pri Homaranismo en perspektivo. Mi mem gvidis kvizon pri Zamenhof (kaj Zdravka kontribuis al la

enhavo) — mi devas diri, ke impresis min, kiom ofte la partoprenantoj ĝuste respondis al miaj demandoj — kelkaj el kiuj foje estis vere iom malfacilaj!

Normando Fleury faris belegan prelegeton pri Zamenhofaj proverboj — estis amuze provi diveni la signifon de kelkaj malpli konataj proverboj (mi ankaŭ konstatis, ke diraĵoj, kiuj kvazaŭ evidentas por ruslingvanoj – kaj ja


Zamenhof estis ankaŭ ruslingvano, interalie – ne estas tute klaraj en la internacia kunteksto).

En la arta parto ni lernis pri julaj karoloj en la traduko de Gene Keyes, ni aŭskultis absolute elstaran prezenton de [Kantik' de Noel'](#) (unu el la tradukoj de Gene) fare de la mondfama kanada kantistino kaj esperantisto Joëlle Rabu, akompanata de sia filo Nico Rhodes. Joëlle Rabu ankaŭ havas registraĵon de tiu ĉi kanto france, kaj ĝi estas aparte proksima al ŝia koro – do ŝi ĝojis, ke ekzistas Esperanta traduko (fare de Gene Keyes) kaj ŝi kun ĝojo donacis ĝin al Esperantujo, okaze de nia Virtuala Zamenhof-festo. Ĝi estas kantita kun granda forto kaj profundaj emocioj, absolute mirinda!

Post la bela filmeto [Omaĝe al la Zamenhofa Tago](#),

Mark Fettes, la antaŭa prezidanto de UEA, absolute brile deklamis la poemon 'La okulisto' de Marjorie Boulton (pri Zamenhof, kompreneble).

La amuziĝa parto komenciĝis per la tostado kaj kuntrinkado je Zamenhof, kaj la saluto de Guy Matte (ĉefdelegito de UEA por Kanado). Mi mem preparis kaj registris tri kantojn por Esperanta karaokeo: [Venceslas' la Bona Reĝ'](#) (en la traduko de Gene Keyes), [Universala Kongreso](#) (unu el "Zambanaj" [zamenhof-bankedaj] kantoj de David Jordan, kun la melodio de "Adeste Fideles", revortumita por Montreala UK), kaj [La Espero Virtuala](#) (melodio de



La Espero, kun vortoj rilataj al la pandemio kaj virtualaj kongresoj). Estas bedaŭrinde, ke momente la teknologio ne permesas vere kunkanti ĉe Zoom – do ni faris tion kun niaj mikrofonoj elŝaltitaj – sed la homoj ŝajne ĝuis tiun sperton!

Andrew Sly, profesia orgenisto kaj estrarano de KEA, ludis kaj kantis plian “zambanan” kanton de David Jordan : Ho Zamenhof (laŭ la melodio de “O Tannenbaum”).

Fine, Mark Fettes (helpe de la marioneta Zamenhof), kies tasko estis ankaŭ aljuĝi libropremiojn (lastajn eldonaĵojn de ESK) por la plej bona kostumo, amuzege faris tion : la honoran mencion ricevis Andy Blair (kiu mem ne estis en la konkurso, kiel unu el kunorganizantoj), por la plej alta kaj impona cilindro. Silvano Auclair ricevis premion kiel portanto de la plej kelnereca kostumo — bela memoraĵo de Zamenhof vojaĝanta perŝipe al Nord-Ameriko. Anna Bennett ricevis premion por la plej bela ĉapelo — klare, klare, memoraĵo de la

kara edzino de sinjoro Ludoviko, Klara Zamenhof! Garry Evans ricevis specialan mencion pro la plej verda ĉapelo. Normando Fleury ricevis la unuan premion por la kostumo — ĝi estis belega kaj tre aŭtentika kostumo de malfrua 19-a jarcento (kaj Silvano eĉ petis, ke Normando ekstaru por vidi “ĉu ankaŭ pantalono estas” 😊).

Post la oficialaj partoj la festo transiris al neformala babilado. Estis kelkaj babilĉambroj, kaj oni povis libere moviĝi por interkonatiĝi, “koktel-stile”. Tio estis ankaŭ ege ĝuinde! Tra la tuto ĉeestis ĉirkaŭ 40–50 homoj.

Babilante kun homoj, mi konstatis, ke ĉiuj vere ŝategis la feston kaj volas daŭrigi — eĉ se aferoj reiros al “normalo” kaj se ni revenos al niaj kutimaj grupoj, tamen ni eble povos elekti iun tagon por ankaŭ denove kunveni

tutkanade por festi la Zamenhof-tagon!

Apartajn dankojn al Andy Blair pro la elstara teknika gvidado kaj Bob Williamson pro la kunorganizado!

Ĵenja Amis



Ĉu plaĉas al vi KVaKi?



Ĉu vi jam KVaKis? Temas ne pri ia provo imiti anason aŭ ranon, sed pri la unua Kanada Virtuala Kunveno (KVK aŭ KVaK), kiu okazis la 21-an de novembro 2020. Ĉu vi ĉeestis? Kiom vi memoras pri tio?

Estraranoj de la Kanada Esperanto-Asocio (KEA) longe diskutis kaj eĉ disputetis inter si pri tio, kian programon ni planu por allogi Esperanto-parolantojn tra Kanado al Zoom-kunveno (kiun afable gastigis Andy Blair). Ni eĉ enketis pri tio inter KEA-anoj. Post la evento oni devis konsenti, ke Geoffrey Greatrex ja pravis: ni enŝovis tro multajn programerojn, tiel ke programo de 2 horoj disvolviĝis al 3,5-hora sprint-maratono. Tamen, laŭ mia humila opinio, multaj interesaj kaj ĝuindaj aferoj okazis.

Mi ne plene priskribos ĉiujn programerojn, sed

gravas memori tion, kio okazis. Eĉ mi mem, kiel

unu el la organizintoj, ne plu memoras ĉion. Kiel klarigis Geoffrey Greatrex, gvidisto dum la evento, nia intenco estis oferti okazon al kanadaj esperantistoj konatiĝi unu kun la aliaj, kaj eble interesi homojn pri nia laboro en KEA. Dum la duonhora antaŭ la programo, kaj en babilejoj dum kaj post la evento, oni multe ĝuis la ŝancojn persone ekkoni homojn de diversaj partoj de la lando,

kaj eĉ de eksterlando. Post la evento, oni enketis pri la sukceso de KVaK kaj trovis, ke ĝis 60 partoprenintoj plej ŝatis tiun interkonatiĝon kaj babiladon. Mi esperas, ke vi havas bonajn memorojn pri tio!





La dua plej ŝatata parto de KVaK estis la prelegoj de eminentuloj. Bonŝance por ni, tri gravegaj eminentuloj konsentis prelegi al ni: Katalin Kováts, Mark Fettes, kaj Duncan Charters. Tiujn tri prelegojn vi rajtas denove spekti en Jutubo <https://mallonge.net/az> (dank' al Jed Meltzer), kaj mi forte rekomendas atentan (se mi rajtas diri) respekton.

Laŭ la post-KVaK-a enketilo, la tria plej ŝatata programero estis la arta prezentaĵo. Pianisto/kantisto Jessica Friesen en Halifakso prezentis la faman kanton de Leonard Cohen, *Haleluja* (kompreneble en esperantlingva traduko). Bele farite.

Krom la tri ĉefprelegoj, okazis aliaj paroloj pri interesaj aferoj. Normando Fleury kaj Zdravka Metz priskribis librojn eldonitajn de la Esperanto-Societo Kebekia (ESK). Erik Pedersen parolis pri la Kanada Antologio, projekto pri tradukado de diversaj kanadaj literaturaĵoj. Paul Hopkins

prezentis la estraron de KEA, kaj enkondukis informojn pri la diversaj aferoj, kiujn KEA traktas. Inter ili, Ĵenja Amis kaj Nicolas Viau parolis pri komunikado kaj pri la transirigo de la revuo *La Riverego* de ESK, kiu lastatempe ankaŭ servis kiel anstataŭo por la KEA-revuo *Lumo*, al la bloga formo. Normando parolis pri la Loka Kongresa Komitato (LKK), kiu daŭre laboras por prepari la Universalan Kongreson en Montrealo, aŭguste de 2022. Mi promesis postnelonge eldoni novan Membroliston por KEA, kaj tion mi faris. Oni ankaŭ varbis KEA-anojn al nia laboro. Ni ĉiuj estas volontuloj, kaj ju pli multe da volontuloj, des pli multe ni kapablos fari.

Fine de la evento post la gratuloj kaj dankoj, mi hazarde elektis la nomojn de kvin ĉeestantoj de KVaK por ricevi premiojn, kiel dankesprimojn: kvar poŝtkartojn pri la neokazinta Montreala UK 2020 kun la bela poŝtmarko desegnita de Ĵenja, kaj unu ekzempleron de nova libro de Normando, *Besta*

Verbaro. Sendube oni neniam aldonos la verbon “anasi” por priskribi tiujn, kiuj KVaKas.


La post-KVaK-a enketilo malkaŝis, ke ne ĉiu partopreninto ŝatis ĉiun programeron. Verŝajne tio estas neevitebla sekvo de iu ajn evento. Tamen, laŭ la ĝenerala pritakso, la evento bonege sukcesis, kaj ni dankas pro ĉiuj opinioj. Tiu sukceso evidentiĝis en la esprimado de granda intereso pri posta retkunveno, la Zamenhof-Festo en decembro, kiu ankaŭ bone sukcesis.

La nuna demando estas, ĉu kaj kiam kaj kiel ni refoje KVaKos. Kion vi opinias?

Bob Williamson (Sekretario de KEA)

Registru vian kurson en Edukado.net!

Vizitu edukado.net/kursejo kaj plenigu facilan formularon. Jam estas preskaŭ 290 enskriboj! Ni nepre metu ĉiujn kanadajn kursojn sur la mapon!



Eventa Servo: ĉiuj eventoj de Esperantujo en unu loko!

Serĉu, partoprenu, organizu eventon en Eventa Servo! Pluraj kanadaj grupoj jam anoncas siajn kunvenojn en Eventa Servo — se via grupo ankoraŭ tion ne faras, estas bona okazo provi ĝin. Kompreneble, se vi ne havas propran kunvenon, aliĝu al kunveno de alia grupo en Kanado. Notu, ke vi ankaŭ povas spekti antaŭregisitajn prelegojn kaj eventojn: iru al eventaservo.org/video. Bonan eventumadon!

Insulo de la Rozoj: Esperanto-ŝtato?

Ĉu eblas, ke la neŭtrala Esperanto iam fariĝis la oficiala lingvo de iu lando? Jes, tio okazis antaŭ ne tro longa tempo en Eŭropo, fakte de 1964 ĝis 1968. Tio estis la revo de iu itala inĝeniero, Giorgio Rosa, kiu decidis starigi platformon en la Adriatiko, proksimume 6 marmeilojn de la bordo vidalvide al Rimini en internaciaj akvoj. Tiu inĝeniero inspiriĝis de sia nomo Rosa por nomi sian “insulon” *Insulo de la Rozoj*. Tiu platformo fariĝis granda turisma allogaĵo. Homoj el multaj landoj iris viziti la sendependan insulon por amuziĝi kaj aĉeti suvenirojn. Tie estis dancejo kaj restoracio. La mikrolando eĉ emisiis poŝtmarkojn en Esperanto. Spite la fakton, ke Rosa faris prezentaĵon eĉ antaŭ la Eŭropa Unio, neniu lando agnoskis la memdeklaritan ŝtaton.

Tamen la utopio ne povis daŭri. La itala registaro

ne estis kontenta pri la fakto, ke tiu “sendependa ŝtato”, tiel proksima al Italio, ne pagas impostojn. Kelkaj ekstremdekstraj parlamentanoj deklaris, ke la insulo reprezentas minacon al NATO-sekureco, eventuale sugestante kovrilon por sovetiaj nukleaj submarŝipoj. Alia motivo de la italoj estis, ke la platformo malstabiligas operaciojn trans la Adriatiko en Jugoslavio kaj eĉ en Albanio.

Do la 25-an de julio 1968, 55 tagojn post sia memdeklaro de sendependeco, la Respubliko de la Rozoj estis kaptita kaj evakuita de la italaj aŭtoritatoj kaj poste detruiita.

Ĉio pri la Insulo de la Rozoj estis brile ilustrita en lastatempa itala filmo lanĉita de Netflix en decembro 2020. Oni povas ĝin spekti en multaj lingvoj, escepte de

Esperanto. Ankaŭ Vikipedio proponas interesan



artikolon pri tiu fenomeno.

Estas (aŭ estis) multaj mikronacioj en la mondo. Eĉ Kanado havis almenaŭ ses. Memoriĝu pri *Royaume de l'Anse Saint-Jean* (Saguenay—Lac-Saint-Jean) kun la reĝo Denys la 1a. Interesa socia kaj historia temo por eventuala artikolo, ĉu ne?

Bildoj : Vikipedio

Trefflé (Trefleo) Mercier (el la blogo de ESK)



Nova animacio en Esperanto!

Jen la [plej nova animacio en Esperanto](#): *La aventuroj de Saĝa Steleto kaj de la Mirinda Teamo*. Tuj post la publikigo por marki la 80-an datrevenon de Renato Corsetti, ĝi jam alproksimiĝas al 1000 spektantoj! La aŭtorino de la

animacio estas Alessandra Madella (Italio). Alessandra estas specialisto pri kinarto kaj granda ŝatanto de la Nacia Filmoficejo de Kanado. Legu ŝiajn artikolojn pri [Norman McLaren en Esperanto](#). En la animacio aperas la voĉoj de la Parma Esperanto-grupo kaj Ĵenja Amis kiel speciala gasto.



Nekrologo por Eduardo Vivancos (1920 - 2020)

La 30-an de decembro 2020 Esperantujo perdis elstaran homon kaj esperantiston.

Eduardo Vivancos [vivankos] atingis 100 jarojn la 19-an de septembro 2020, sed, bedaŭrinde, li forpasis sole kaj izolite pro la pandemio en Toronta maljunulejo : pro pneŭmonio, komplikigita de KOVIM-19. Lia sindona filo, Floreal, malfeliĉe, ne povis esti kun li je la fino, kaj liaj amindaj edzino (Ramona) kaj filino (Talia) forpasis antaŭ li.

Eduardo Vivancos estis humila, honesta, ĝentila homo, kiu radiis paciencajn kaj toleremajn sintenojn al preskaŭ ĉiuj siaj konatoj, krom eble se temis pri la faŝismo sub Franko, kiun li kontraŭbatalis (1936–1939) kaj kontraŭstaris kiel fiera kataluno (*vidu noton 1*) dum jaroj.

Dum la longa vivo, Eduardo travivis multajn malfacilaĵojn kaj nestabilajn epokojn, kiel la perditan Hispanan civilan militon, la sekvantan ekzilon kaj malliberecon en koncentrejoj en Francio/Germanio (*vidu noton 2*) dum la Dua



Mondmilito, kaj la elmigradon al Kanado kun sia juna familio en 1954. Sed iel, verŝajne pere de siaj viv-lecionoj kaj aliĝo al diversaj mondmovadoj kaj filozofioj, li posedis kaj disvolvis admirindan animon, kiu subtenis lin kaj inspiris lin agadi. Krom sia proksimiĝo kun la anarkiisma movado, la kontraŭ-faŝisma movado, la internacia movado de veteranaj atletoj, la liberecana revolucio, kaj la Kanada-Hispana Asocio, Esperanto ĉiam restis ege grava por li.

Eduardo estis tre agadema pri Esperanto tra sia vivo, ĝis kiam li ne plu povis. En kaj pri Esperanto li varbis, instruis, informis, redaktis diversajn organojn, skribis artikolojn, tradukis libron, starigis ekspoziciojn, kaj produktis filmeton. Li invitis al Toronto en 1973 kaj ĉeforganizis la unuan (ekster Eŭropo) mondkongreson de sia preferata Esperanta asocio, la Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT). Krome, li ĉiam strebis plibonigi sian propran edukon kaj sciadon. Kvankam li eklaboris, kiam li havis nur 14 jarojn, li daŭre studadis, ĝis li magistriĝis pri hispana literaturo en la Universitato de Toronto, dum li laboris en



poŝtoŝticejo por subteni sian familion. Eĉ kiam lia vidkapablo komencis malpliboniĝi en la maljunulejo, Eduardo daŭre interesiĝis kaj legis pri mondaferoj en sia ĉambro pere de komputilo, kiu vidigis la tekston per grandegaj literoj. Tiel obstina kaj optimista estis Eduardo.

Malgraŭ ke Eduardo estis ĉefe membro de SAT, antaŭ kelkaj jaroj, dum la Universala Kongreso en Seulo (2017), UEA donis honorigon al Eduardo por agnoksi lian kontribuon al Esperanto.

Eduardo restos kiel ekzemplo de la ideala esperantisto kaj homo, kiu posedis la plej admirindajn kvalitojn : amikecon, toleremon, etikon, optimismon, obstinon, agademon kaj principemon... sed sen eĉ unu fadeno da egoismo.

Dankon, Eduardo. Ripozu paco.

Alice Kazmierowski

Komentoj de Xavi Alcalde, esploristo de la vivo de Eduardo Vivancos.

1. Pri fiero kataluno.

En la 1990-aj li kunlaboris regule kun la gazeto de la Kataluna Centro de Toronto. Li estis fiero pro tio, ke, kvankam li ne apogis sendependismon, li verkis katalanlingve pli bone ol la plej fanatikaj tiurilate. Sendube, li ŝatis la katalunan kulturon, li parolis denaske kaj hispane kaj katalune. Dum sia tuta vivo, la familio de lia patrino estis katalunparolanta, kaj en tiu lingvo li nature parolis kun ili. Sed por li la ideo de homaraneco estis pli grava ol iu ajn nacia konsidero. Estas anekdoto prie. En franca koncentrejo li konatiĝis kun elstara esperantisto, Jaume Grau Casas, vicprezidinto de la Akademio de Esperanto. Fakte, Eduardo eklernis la lingvon pere de libro verkita de Jaume Grau. Tiu estis kataluna naciisto, kaj certe ne anarkiisto. Sed tiam ili amikiĝis kaj ĉiam parolis en Esperanto. Eduardo rakontis, ke ambaŭ kapablis paroli la samajn kvar lingvojn: kataluna, hispana, franca kaj Esperanto. Grau emocie diradis, ke el tiuj kvar la plej ligata al sia koro estas la kataluna. Dume, por Eduardo tiu plej ligata al sia koro estis Esperanto. En Toronto li diplomiĝis kaj magistriĝis pri hispana literaturo, sed li kleriĝis ankaŭ pri la kataluna lingvo kiel aŭtodidakto. Liaj artikoloj en la gazeto de la Kataluna Centro de Toronto estas bonegaj. Dum tiuj de la aliaj kunlaborantoj prezentas erojn de la kataluna folkloro aŭ la kataluna kuir-arto, tiuj liaj uzas la katalunan lingvon por klarigi interesajn detalojn de liaj vojaĝoj al

foraj landoj (Japanio, Ĉinio, Ruslando...), inkluzive de la historio de tiuj landoj. Krome, en kelkaj el tiuj artikoloj li ankaŭ verkis pri la kataluna literaturo. Resume, li estis fiera katalunano *kulture*, sed ne *politike*. Eble la nuna redaktado, « la faŝismo sub Franco, kiun li kontraŭbatalis (1936–1939) kaj kontraŭstaris kiel fiera kataluno, dum jaroj », miksas la du aferojn. Miaopinie li kontraŭstaris tion dum sia tuta vivo kiel kontraŭfaŝisto, humanisto, idealisto kaj demokrato.

2. Pri koncentrejoj en Francio / Germanio.

Li certe konis la fifamajn koncentrejojn en Francio. Sed pri Germanio la afero malklaras. Kiam mi demandis lin pri tio, li donis malsamajn kaj iom ambiguajn respondojn, kaj la familio ne bone konas tiujn detalojn. Iel ajn, mi trovis en malnova intervjuo (do kiam lia memoro kaj menso tute bone funkciis) mencion pri lia tiama restado en Germanio. Kion mi ne certas estas, ĉu li estis en lagero/koncentrejo aŭ devige en ia laborejo pere de tielnomataj laborkompanioj, verŝajne en la kadro de organizo Todt. Unu fojon li diris al mi, ke ankaŭ en Germanio li uzis Esperanton, sed ke tio estis pli malfacile ol en Francio kaj ke oni devis priatenti tion. Samtempe, plurfoje li diris al mi, ke la gardistoj en Germanio estis malpli kruelaj kun la hispanaj laboristoj ol tiuj francaj kaj senegalaj en Francio. Eble la du aferoj ne estas kontraŭdiraj. La kampoj en Francio estis grandegaj (Argelès havis 77 000 homojn !) kaj do malfacile oni povis kontroli, en kiu lingvo la rifuĝintoj [kiuj ĝenerale havis malmulton por fari] parolis inter si. Dum deviga laborado

verŝajne oni havis malpli da okazo por esperantumado. Kaj pri la gardistoj, mi trovis similajn rakontojn ĉe aliaj veteranoj. Simpligante la aferon, oni povus diri, ke la francaj gardistoj konsideris ilin kiel krimulojn [simile al tio, kio okazas nuntempe por aliaj rifuĝintoj en aliaj landoj], dum la germanoj iel respektis ilin pro ilia kuraĝo montrita dum la Hispana milito. [Kompreneble, ankaŭ multaj hispanoj estis senditaj al naziaj ekstermejoj, sed bonŝance tio ne okazis al Eduardo.]

Postparolo

Por lerni pli pri la vivo de Eduardo Vivancos, aŭskultu la [bonegan prelegon](#) de Xavi Alcalde, kiu okazis kadre de MondaFest. En la lasta numero de [La Riverego \(142-144\)](#) estas ankaŭ bonega artikolo de Xavi pri Eduardo Vivancos. — Red.



Nokta Ŝoforo: nova albumo de Yves Desrosiers — en Esperanto!

Jen bela novaĵo por muzikŝatantoj — konata kebekia muzikisto Yves Desrosiers lanĉis novan albumon kun Esperanto-titolo kaj kun unu kanto plene en Esperanto — la sola kantita peco de la ĉefe instrumenta albumo: Nokta Ŝoforo. La E-tradukon de la franca faris Trefleo Mercier (tradukisto laŭprofesie). La albumo estis lanĉita virtuale la 18-an de marto, kaj ankaŭ ĉeesta koncerto okazis la 20-an de marto en Ŝerbruko.

La oficejo de s-ro Desrosiers donacis al esperantistoj 8 biletojn, kaj mi estis mem bonŝanca ĉeesti la virtualan koncerton. Ĝi estis brila — mi ŝategis la muzikon (ĵazeca, etosa,

kontempla) kun gitaroj, blovinstrumentoj, klavaro, drumoj, kun belaj fonaj videaĵoj ktp. Yves Desrosiers estas mem plurinstrumenta muzikisto,


kapabla ludi pli ol deko da muzikiloj, kaj li estas ankaŭ kantisto. Notu ke baldaŭ intervjuo kun s-ro Desrosiers aperos en revuo Kontakto—ne maltrafu!

Ĉeestantaj

esperantistoj, ĉefe el Kebekio, sed ankaŭ de Francio kaj Brazilo, ĉeestis, kaj multe ĝuis kaj virtuale aplaudis kaj komentis en Esperanto en la koncerta babilejo. La informoj pri tiu ĉi albumo aperis en ĉiuj ĉefaj gazetoj de Kebekio. Bravo, Yves, bele farite!

Ĵenja Amis





19 mars 2021 2h00 / Mis à jour à 4h20
Yves Desrosiers: la musique universelle de l'espéranto

Yves Desrosiers sur les routes de l'espéranto

[Accueil] / [Culture] / [Musique]



Photo: Valérian Mazataud Le Devoir Le résultat de l'album «Nokta ŝoforo» — «chauffeur de nuit» en espéranto — est une fresque. Avec des motifs mélodiques remarquables. Ce n'est pas simplement un album instrumental. D'ailleurs, comme Yves Desrosiers le dit, «C'est un voyage...»

Tous les paysages d'Yves Desrosiers



Esperanto-Karaokeo: Venceslas' la Bona Reĝ'

Traduko: Gene Keyes, kantis: Ĵenja Amis, prezentita dum KVaK-2020!
Aŭskultu la registraĵon ĉi tie. Vidu aliajn julajn partiturojn de G. Keyes ĉi tie.

1
*Venceslas' la bona reĝ,
Je la Stefan-festo;
Spektis ĉe profunda neĝ'
Kvazaŭ blanka vesto.
Hele lumis nokta lun',
Kvankam frost' kruelis
Malriĉul' aperis nun;
Por brulaĵ' li celis.*

2
*"Ho paĝi', informu min;
Kiu, tiu homo?
Se vi scias diru ĝin;
Kie, kia domo?"
"Loĝas li tri mejlojn for,
Tie sub la monto;
Ĉe arbar-baril', sinjor';
Apud sankta fonto."*

3
*"Pin- ŝtipar', viand', kaj vin';
Mendu ilin mien;
Vi kaj mi provizos lin;
Alportinte tien."
Iris for reĝ' kaj paĝi',
Paro voj-marŝanta;
Tra la vintro tia ĉi;
Kaj la vent' muĝanta.*

4
*"Nokt' mallumas pli, sinjor',
Kaj la vent' pli blovas;
Malkapablas mia kor';
Pluen mi ne povas."
"Mian spuron, bon-paĝi',
Paŝu ĝin kuraĝe;
Tiel vent' frostigos vin,
Des malpli sovaĝe."*



5
*Paŝojn de la mastro mem,
Uzis la helpulo;
Grund' varmiĝis sub la prem'
Planda de l' sanktulo.
Do, kristanoj, tial ĉi,
Malgraŭ ĉia ĝeno;
La malriĉajn benu vi;
Al vi venos beno.*

Esperanto-Karaokeo: Universala Kongreso

Vortoj: David K. Jordan, kantis: Ĵenja Amis, prezentita dum KVaK-2020!

Aŭskultu la registraĵon ĉi tie. Vidu aliajn zambanajn kantojn ĉi tie.

La Problemo:

Ĉu via loka klubo okazigas zamenhofan bankedon en decembro? (Jes.).

Kaj ĉu kantemas kelkaj el la grupanoj? (Mi konfesas, ke jes)

Kaj ĉu pro la sezono emas ili kanti kristnaske? (Bedaŭrinde, jes)

Kaj ĉu kontraŭstaras aliaj membroj dirante, ke temas tute ne pri religia festo sed anstataŭe esperantuja? (Jes, suspiriga afero! Des malpli bone, kelkaj proponas, ke Esperanto estas religio.)

La Solvo:

Jen do la solvo de via problemo: Absolute k tute ne kristanaj zambanaj kantoj laŭ konataj kristnask-kantaj melodioj! (Hura!)

Kantu kaj ĝuu! (Plurfoje hura!)

David K. Jordan.

Venu, fidelaj! Venu al l'Kongreso!

Venu, ho venu, en harmoni'!

Kun la vortaro

Flugu trans la maro!

Vizitu Montrealon, (3-foje)

En Kebeki'!

Aŭskultu diskutojn, kantojn kaj balbutojn!

Librojn aĉetu kun poezi'!

Skribu poŝtkarte,

Himnon kantu parte.

Vizitu Montrealon, (3-foje)

En Kebeki'!

Ekskursojn, prelegojn, komitatkunvenojn,

distrajn programojn ĉeestu kun ni!

Gaje bankedu!

Ne dubulojn kedu!

Vizitu Montrealon, (3-foje)

En Kebeki'!

Esperanto-Karaokeo: La Espero Virtuala

**Vortoj: Shin-ichirou Koubuchi (unue aperis en Revuo Orienta, dec. 2020),
kantis: Ĵenja Amis, prezentita dum KVaK-2020! Aŭskultu la registraĵon [ĉi tie](#).
El la tri karaokeaj kantoj, tiu ĉi fariĝis plej populara, kun jam 200+ spektroj!**

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta VK;
Per fluiloj de la ret-elsendo
Nun de loko fluu ĝi al loko.
Jes al klavo tajpon soifanta
Ĝi la homan tiras familion:
Al la mond' viruse limitanta
Ĝi promesas sanan harmonion.

Ĉe ekranoj dum la programero
Kolektiĝas pacaj babilantoj,
Kaj fluide kuras la afero
Per laboro de la teknikantoj.
Morte svarmas murdoj pro-KOVIM-aj
Inter la popoloj dividitaj;
Sed dissaltos la obstakloj timaj,
Per la sankurado disbatitaj.

Sur teknika reta fundamento,
Parolante kune kun alia,
La popoloj faros en l' evento
Virtualan mondon familian.
Nia diligenta Montrealo
En laboro loka ne laciĝos,
Ĝis la E-aranĝo en realo
Per eltena pen' efektiviĝos.



Ĉu ĉiuj esperantistoj ekuzu Telegram? Kaj kial?

Ĉu la retaj gigantoj jam havas tro da potenco? Ĉu esperantistoj devus ekserĉi alternativojn? Tion opinias Yves Nevelsteen, komisiito de UEA pri reta agado, kiu aktive instigas esperantistojn ekuzi Telegram. La redakcio de Libera Folio petis lin klarigi kial Telegram laŭ li estas la plej bona mesaĝilo por esperantistoj – kaj por ĉiuj aliaj. La Lumo republikigas tiun ĉi artikolon kaj invitas ĉiujn esperantistojn en Kanado ekuzi Telegram!

Antaŭ nelonge la tujmesaĝilo WhatsApp ŝanĝis sian privatecpolitikon. Uzantoj, kiuj malakceptas la novajn uzkondiĉojn, ekde februaro 2021 povos perdi la aliron al Messenger-babilejoj kaj eĉ al sia Facebook-konto. Kiam al tio aldoniĝis la silentigo de la prezidento de Usono en Twitter kaj Facebook, multaj homoj serioze ekserĉis alternativojn por Facebook, Messenger kaj WhatsApp.

Sufiĉas – ne plu oni konsentas kun la filozofio de tiu monavida firmao Facebook. Post multe da diskutado, komparado kaj esplorado, mi aktive ekvarbis kaj plu varbadas, por ke esperantistoj ekuzu Telegram. Mi provos klarigi al

vi kial, uzante interalie argumentojn kiujn mi trovis en la blogo de Pavel Durov, la kreinto de Telegram.

Telegram estas senpaga, nuba tujmesaĝilo. Ĝi estas disponebla por poŝtelefonoj (Android, iOS) kaj komputiloj (Windows, macOS, Linux). Uzantoj povas telefoni kaj videovoki per ĝi, sendi per ĝi voĉmesaĝojn kaj interŝanĝi bildojn, filmetojn, glumarkojn, voĉmesaĝojn kaj ĉiajn dosierojn.

Homoj ne plu volas interŝanĝi sian privatecon kontraŭ senpagaj servoj. Ili ne plu volas esti ostaĝigitaj de teĥnikaj monopoluloj, kiuj ŝajnas pensi, ke ili povas fari



Telegram

kion ajn, kondiĉe ke iliaj programoj havas sojlan amason da uzantoj. Se vi ne bone scias, pri kio temas – kaj eĉ se vi scias – mi invitas vin spekti [ĉi tiun klarigan filmeton](#), kiun kreis la videoblogisto Jezer Dorante.

Kun duona miliardo da aktivaj uzantoj (!) kaj akceliĝanta kresko, Telegram fariĝis unu el la plej grandaj rifuĝejoj por tiuj, kiuj serĉas komunikan platformon engaĝitan pri privateco kaj sekureco. La homoj malantaŭ Telegram ĉiam estis konsekvencaj, se temas pri defendado de privataj datumoj kaj plibonigo de la programoj kiujn ili proponas. Mi pri tio citas afiŝon de Pavel Durov el 2018:



Vi – niaj uzantoj – estis kaj ĉiam estos nia sola prioritato. Male al aliaj popularaj programoj, Telegram ne havas akciulojn aŭ reklamantojn al kiuj raporti. Ni ne faras interkonsentojn kun komercistoj, datumistoj aŭ registaraj agentejoj. Ekde la tago kiam ni lanĉis Telegram en aŭgusto 2013, ni ne malkaŝis al eksteruloj eĉ bitokon de la privataj datumoj de niaj uzantoj.

Ni funkcias tiel, ĉar ni ne rigardas Telegram kiel

organizon aŭ programon. Por ni, Telegram estas ideo; ĝi estas la ideo, ke ĉiuj sur ĉi tiu planedo rajtas esti liberaj.

Se oni komparas la diversajn komunikilojn, evidentiĝas ke ne nur la filozofio de Facebook estas problema, sed ke alternativaj komunikiloj estas ankaŭ simple pli bonaj.

Foje mi aŭskultas muzikon kaj tial ne aŭdas kiam iu kontaktas min. Krom se oni kontaktas min per Telegram, ĉar mia iPad estas mia muzikilo kaj eblas agordi sonajn sciigojn. Telegram per la nubo flue sinkronigas ĉiujn viajn datumojn kun ĉiuj viaj aparatoj, kontraste al WhatsApp. Ja ekzistas

WhatsApp Web, sed ĝia funkciado estas diversmaniere limigita.

Kiam mi komunikas per Messenger, ofte erarigas min aŭtomata korektilo kiun mi uzas. Korekti senditan tekston per Messenger malfacilas, kaj videblas, kiam oni forigis mesaĝon. Per Telegram rapide kaj facile eblas ŝanĝi senditaĵojn. Tio ŝajnas esti detalo, sed sendube ne nur mi spertis tion kaj

Lokaj grupoj por Kanado CA

- [Esperanto Ameriko](#) - por esperantistaj amerikanoj (1009 membroj)
- [Esperanto - English](#) - por esperantistaj anglalingvanoj (436 membroj)
- [Français kaj Esperanto](#) - por esperantistaj franclingvanoj (218 membroj)
- [Esperanto - Русский](#) - por esperantistaj ruslingvanoj (165 membroj)
- [Kanadanoj CA](#) - por esperantistaj kanadanoj (32 membroj)

Eventoj, nun kaj baldaŭ 🎉

- [Retoso](#) - por la reta evento Retoso, de la 2-a ĝis la 5-a de aprilo (71 membroj)

taksas seneraran lingvouzon grava.

Eblas per Telegram sendi dosierojn ĝis 2 GB. Tio ofte helpas en iuj laborfluo, ekzemple kiam oni kunlaboras pri kreado de filmetoj. Facebook limigas al 25 MB, WhatsApp al 100 MB ...

Facebook havas tutan fakon por ekscii kial Telegram estas tiel populara, kaj ĝi aktive varbas per multekosta reklamo – kaj alimaniere. Facebook povus facile ŝpari dek milionojn da dolaroj; jen la sekreto: respektu viajn uzantojn.

Milionoj da homoj indignas pro la plej nova ŝanĝo de WhatsApp-kondiĉoj, laŭ kiuj nun la uzantoj devos liveri ĉiujn siajn privatajn datumojn al la reklamilo de Facebook. Ne surprizas, ke akceliĝis la fuĝo de WhatsApp-uzantoj al Telegram, okazanta jam de kelkaj jaroj.

Kun ĉirkaŭ 500 milionoj da uzantoj, Telegram fariĝis grava problemo por la kompanio Facebook.

Nekapabla konkurenci kun Telegram pri kvalito kaj privateco, WhatsApp de Facebook ŝajnas esti ŝanĝita al sekreta merkato: Vikipediaj redaktoroj elmontris, ke multaj pagitaj robotoj aldonas antaŭjuĝajn informojn al la artikolo pri WhatsApp en Vikipedio. La Telegram-teamo ankaŭ malkovris robotojn, kiuj disvastigas malprecizajn informojn pri Telegram en sociaj retoj.

Mito 1. “La kodo de Telegram ne estas malfermfonta”. Fakte, ĉiuj programoj de Telegram -klientoj estas malfermfontaj ekde 2013. La ĉifrado kaj la t.n. aplikprograma interfaco estas plene dokumentitaj kaj estis reviziitaj de sekurespertuloj milfoje. Cetere, Telegram estas la sola mesaĝa programo en la mondo, kiu havas kontroleblajn versiojn por iOS kaj Android. WhatsApp intence malklarigas sian kodon, malebligante kontroli ĝiajn ĉifradon kaj privatecon.

Mito 2. “Telegram estas rusa”. Fakte, Telegram ne havas servilojn aŭ oficejojn en Rusio kaj estis blokita tie de 2018 ĝis 2020. Telegram ankoraŭ estas blokita en iuj aŭtoritatemaj landoj, kiel Irano, dum WhatsApp kaj aliaj “supozeble sekuraj” programoj neniam havis problemojn en tiuj lokoj.

Kulturo

- **Muziko** 🎵 - por paroli pri ĉia muziko (343 membroj)
- **Ridigu min!** - por amuzaj aferoj (280 membroj)
- **Fotoj** 📷 - por konigi belajn fotojn kun aliuloj (212 membroj)
- **Filozofio** 😊 - por esperantistaj filozofoj (166 membroj)
- **Sakuroj kaj Cunderoj** 🌸 - por diskuti animeojn, mangaajn kaj aliajn japanajn kulturajn (142 membroj)
- **En la kuirejo kun Telegramo** - por kunhavigi fotojn de manĝoj (137 membroj)
- **Landoj** - pri landoj kaj iliaj kulturoj (124 membroj)
- **Artumejo** 🎨📄🗨️ - por krei kaj ĝui artaĵojn (103 membroj)
- **Glumarkujo** - por sendi glumarkojn (92 membroj)
- **Flagoj** 🚩 - pri flagoj, veksilologio kaj rilataj temoj (71 membroj)
- **Sportoj** - por paroli pri sportoj (55 membroj)
- **EsperOri - Esperanta Grupo pri Origamio** - por origamio (54 membroj)
- **Modo kaj vestaĵoj** 👗👔👖 - pri modo kaj vestaĵoj (43 membroj)
- **Dancoj** - pri dancoj kaj dancado (39 membroj)
- **Manlaboro en Esperanto** - grupo por manlaboraĵoj (24 membroj)

Mito 3. “Telegram ne estas ĉifrita”. Ĉiu babilejo ĉe Telegram estas ĉifrita ekde la lanĉo. Ni havas sekretajn babilejojn kun fin-al-fina ĉifrado kaj nubajn babilejojn, kiuj ankaŭ proponas realtempan sekuran kaj distribuitan nuban konservadon. WhatsApp, aliflanke, havis nulan ĉifradon dum kelkaj jaroj, kaj poste adoptis ĉifran protokolon financitan de la usona registaro. Eĉ se ni supozas, ke la WhatsApp-ĉifrado estas solida, tion nuligas multaj malantaŭaj pordoj kaj la dependeco de sekurkopioj.

Sole en 2019, Facebook elspezis preskaŭ 10 miliardojn da dolaroj por merkato. Male al Facebook, Telegram ne elspezas monon por

merkato, kaj certe ne miliardojn da dolaroj. Ni kredas, ke homoj estas sufiĉe inteligentaj por elekti, kio estas plej bona por ili. Kaj, se juĝi laŭ la duonmiliardo da homoj uzantaj Telegramon, ĉi tiu kredo praviĝas.

Kiu reta komunikilo plej taŭgas por esperantistoj? Telegram. Sed kial?

Utilas, laŭ mi, uzi poŝtelefonajn aplikaĵojn en Esperanto, ĉar uzante ilin, vi aŭtomate lernas teĥnikajn vortojn kaj alkitimiĝas al ili.

Facebook kaj Messenger parte ekzistas en Esperanto, sed bedaŭrinde ĝia tradukejo (mirige) estas tre malbone farita. Esperantistoj, kiuj multe kontribuis al ĝia tradukado, kiel Paul Peeraerts, rezignis.

Telegram ekzistas en (bona!) Esperanto. Kunordigas la traduklaboron Robin van der Vliet. Nur Robin aprobas proponitajn tradukojn; la kvalito vere estas tre bona. Robin komencis tiun traduklaboron fine de 2015. En 2018 nova (bona!) tradukejo estis lanĉita, en kiu Esperanto trovis lokon. Ekde tiam mi kunlaboras pri la traduklaboro. Por Telegram ni multe uzis la vortaran projekton [Komputeko](#) kaj kontribuis al ĝi. Komence de aprilo 2020 la traduko estis finpretigita por ĉiuj tradukeblaj versioj. Entute

temas pri pli-malpli 16 000 frazoj!

Nur de Telegram X por Android ekzistas ĝis nun oficiala Esperanta traduko. Por helpi oficialigi ĉiujn aplikaĵojn, vi povas uzi kaj testi la tradukon (kaj inviti ankaŭ viajn Esperanto-amikojn amase uzi ĝin), por trovi la lastajn erarojn kaj por montri al Telegram, ke ĝia oficialeco estas dezirata de la komunumo.

Se vi jam uzas Telegram, alklaku [ĉi tiun ligilon](#) por ekuzi ĝin en Esperanto.

Se ni volas progresigi Esperant(uj)on, gravas laŭ mi esence du aferoj:

- Igi Esperanton pli utila.
- Progresigi la lingvonivelon de ĝiaj parolantoj.

Telegram povas efike helpi pri ambaŭ tiuj celoj. Ekzistas tuta komunumo de esperantistaj Telegram-uzantoj en www.telegramo.org. Ĉar ekzistas multaj temaj grupoj, esperantistoj – finfine! – povas uzi la lingvon ne nur por “paroli Esperanton”, sed por interŝanĝi ideojn kun homoj kiuj interesiĝas pri samaj temoj. Tio estas giganta diferenco, vere, se temas pri motiviĝo por daŭre okupiĝi pri Esperanto. Mi rimarkas, ke multe kreskis kaj plu kreskas tiuj grupoj. Por doni al vi ideon, jen kelkaj ciferoj:

KULTURAJ GRUPOJ

Muziko 🎵 – por paroli pri ĉia muziko (342 membroj)

Ridigu min! – por amuzaj aferoj (280 membroj)

Fotoj 📷 – por konigi belajn fotojn al aliuloj (209 membroj)

Filozofio 🧠 – por esperantistaj filozofoj (166 membroj)

PRILINGVAJ GRUPOJ

Literatura babilejo 🗨️ – por paroli pri libroj (346 membroj)

Esperantologio – diskutoj pri gramatiko, etimologio kaj aliaj aferoj rilate Esperanton (310 membroj)

Lingvemuloj 🌐 – por paroli aliajn lingvojn kaj paroli pri aliaj lingvoj (201 membroj)

Skribsistemoj ✍️ – por paroli Esperante pri aliaj skribsistemoj aŭ eĉ per aliaj skribsistemoj (134 membroj)

GRUPOJ PRI LUDOJ

Ludoj en Esperanto – por ludi Esperantajn ludojn (181 membroj)

Videoludemuloj 🎮 – por paroli pri videoludoj (165 membroj)

Homlupo 🤖 – por ludi la ludon Homlupo per roboto (79 membroj)


Ŝakludantoj ♟️ – por organizi ŝakludojn (74 membroj)

La plej granda grupo, Esperantujo, havas preskaŭ 1 600 membrojn!

Telegram ekzercas kaj aktivigas esperantistojn.

Antaŭe, plej multaj esperantistoj uzis Esperanton aktive nur kelkfoje jare, dum renkontiĝoj aŭ en lokaj kluboj. Oni legis, verkis leterojn. Poste, kiam aperis interreto, pli kaj pli da homoj interŝanĝis retmesaĝojn. Sed nun! Per Telegram vi povas retbabili, telefoni kaj eĉ videovoki. La mondo multe ŝanĝiĝis, kaj la utilo de Esperanto draste pliiĝis. Vere ni ne subtaksu tion; se ni kunlaboras por efike uzi interretajn ilojn, ni estas nehaltigeblaj.

Unu el la plej bonaj manieroj lingve progresi estas ĉiutage iomete ekzerciĝi. Aperas multaj novaj iniciatoj; mi ekzemple persone antaŭ du semajnoj ekgvidis kurson por belgaj progresantoj. Ni renkontiĝas ĉiun duan semajnon per Zoom, sed preskaŭ ĉiutage mi ion novan afiŝas en la



Telegram-kursogrupo. Ni kune, 15-ope, tiel progresas. La kurso temas ne nur pri gramatiko, sed ankaŭ pri la Movado. Mi instigas progresantojn aktive partopreni en Esperantujo – per Telegram!

Mi kreis detalan [filmetan prezenton pri Telegram](#). Ĝi estis montrata dum la pasintsomera Virtuala Kongreso de Esperanto.

Se vi pripensas ekuzi Telegram, ne hezitu kontakti min. (Vidu sube kiel.) Mi konscias ke ne estas evidente ekuzi ĝin. “Ĉu indas? Ĉu ne pli bone uzi Signal? Kiu pagas por Telegram?” Mi individue respondos al ĉiuj viaj demandoj kaj persone klarigos al vi kiel elŝuti kaj ekuzi ĝin per ĉiuj viaj aparatoj, kaj respondos al ĉiuj viaj demandoj.

Yves Nevelsteen, el [Libera Folio](#)

Telegramo.org estas parto de Fonduso Instigo, kiun Yves Nevelsteen kreis kun la celo kolekti donacojn por liveri profesiecajn retajn servojn en Esperanto. Yves verkis detalan raporton pri sia reta agado en 2020. Se vi volas ricevi ĝin, kontaktu lin per <https://t.me/yvesnev> – <https://fb.com/yvesnev> aŭ yves@ikso.net

La 9-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj 2021

La festivalo estas dediĉita al infanoj, junuloj, plenkreskuloj kaj pliaĝuloj. Ĉiu partoprenanto bonvolu alsendi sian videon kun registrita kanto en la lingvo Esperanto kun samtempa alsendo de la partituro kaj la teksto de la kanto – ĝis la 15-a de aŭgusto – esperanto-festivalo-vroclavo.eu.

Tiel okazos konkursa provaŝkulto de partoprenantoj. Antaŭ ĉio bonvolu sendi plenigitan aliĝilon. Ĉi-jare la publiko aljuĝos sian premion, la Publik-premion, nur al videokantoj. La voĉdonado okazos rete ekde la 15-a de aŭgusto.

La Festivalo okazos en tri kategorioj:

1. koruso aŭ ensemblo
2. soloisto
3. registrita en studio.

La 12-an de septembro – okazos Koncerto de la Premiitoj rete. Honoran patronecon pri la festivalo jam akceptis Bohdan Aniszczyk, la Prezidanto de la Komisiono pri Edukado kaj

Junularo (de la urbo Vroclavo), kaj la organizaĵoj: Universala Esperanto-Asocio (UEA), Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), Eurokka (muzika faka asocio de UEA, la kreinto de la eldonejo Vinilkosmo), Juna Amiko (“la plej konata kaj ŝatata revuo de Esperantujo”) kaj Varsovia Vento (interreta radio). La organizanto estas la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado (Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej).

Atendas vin multaj belegaj premioj! Unu el la premioj fondis EUROKKA, estas 3 premioj – jarabonoj al ABONKLUBO (alio al la kompleta katalogo de Vinilkosmo, al katalogoj de 75 000 aliaj sendependaj eldonejoj kun 400 000 artistoj kaj 7 milionoj da titoloj). Ĉiaj informoj estas riceveblaj ĉe la adreso:

festivalo.eo@gmail.com (skribu en la temo de la mesaĝo: E-kanto), www.ecem.com.pl, [facebook.com/efekantoj/](https://www.facebook.com/efekantoj/).

El revuo Esperanto (aprilo 2021)



IKU 2021 kaj tutmonda kurso pri KOVIM-19 en Esperanto

Pasintjare la estro de la Internacia Kongresa Universitato estis kanadano kaj estrarano de KEA – Geoffrey Greatrex. Eĉ se en la originalaj planoj estis organizi ĝin vive, dum la UK en Montrealo, la IKU okazis dum la Virtuala Kongreso (VK), en somero-2020. Ni proponas al ĉiuj legantoj konsideri fariĝi IKU-preleganto por la UK-2022. La detaloj anonciĝos post iom da tempo. Kaj – legi la prelegojn de IKU-2020 kaj laŭeble ĉeesti la IKU-2021! – Red.

Internacia Kongresa Universitato

La ĉi-jara rikolto de proponoj por la Internacia Kongresa Universitato (IKU) estis malgranda je nombro, sed kvalite alta kaj varia laŭteme. La IKU-komisiono (Sabine Fiedler, Michael Maitzen, José-Antonio Vergara, Amri Wandel kaj Jingen Wen) rekomendis sep IKU-prelegojn, el ili kvar havos po unu daŭrigan prelegon, kadre de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS).

La detaloj videblas en la tabelo. Fine de ĉiu el la kvar AIS-kursetoj okazos ekzameneto kaj estos disdonata AIS-atesto. Kiel kutime ekde 2015, okazos ankaŭ la Scienca Kafejo, kadre de kiu okazos ĉi-jare kvar duonhoraj prelegoj. La resumoj de la 11 prelegoj, same kiel la biografietoj de la prelegantoj, troveblas en la IKU-retejo, uea.org/teko/IKU/.

La IKU-libro aperos antaŭ la UK, rete kaj papere. Kiel pasintjare ĝin eldonos “Impeto” kaj la reta

nomo	nomo pr.	temo	titolo
AIS	IKU		
Beecham	Gabriel	Medicino	Esenco kaj estonteco de la intensa medicino por spiraj malsanoj
Bronštejn	Mikaelo	Literaturo	La Katastrofo kaj ties bardoj
Jacobsen	Jesper	Matematiko	Fraktoj
Keyhan	Sayadpour	Medicino	Kovimo kaj Koro
Maurelli	Francesco	Robotiko	Lunesplorado: robotikaj aliroj
Raola	Orlando	Kemio	Evoluo de komputada kemio cele al solvo de kemiaj problemoj
Wandel	Amri	Astrofiziko	Nigraj truoj kaj gravitaj ondoj
Scienca Kafejo			
Brandenburg	Ulrich	Politiko	Diplomatiaj mekanismoj por fortigi pacon kaj konfidon
Madella	Alessandra	Kinarto	Kina teorio kaj Esperanto en debatoj ekde la 50-aj jaroj
Spanò	Sara	Psikologio	Vivmalsano: plurfaceta manifestiĝo kun longa historio
Striganova	Anna	Literaturo	Ĉu ekzistas malbono en antikvaj fabeloj?

versio estos senpage elŝutebla. La papera versio estos laŭplane aĉetebla rete per la Libro servo de UEA kaj fizike, se okazos ĉeesta kongreso en Belfasto. La prelegoj tiuokaze realiĝos kaj ĉeeste kaj virtuale, dum la 2-a Virtuala Kongreso. Se la UK ne povos okazi, ili tamen efektiviĝos virtuale, kiel pasintjare, kadre de la VK2.

Kurso pri la pandemio de la Monda Organizaĵo pri Sano en Esperanto

La Monda Organizaĵo pri Sano (MOS; angle WHO) lanĉis Interretan kurson pri KOVIM-19 en 50 lingvoj, inter ili Esperanto. La Esperanto-tradukon iniciatis Adam Eng el Malajzio. Herman Deceunink iom reviziis ĝin kaj verkis ‘klarigan vortliston’ de Esperanto-tradukoj por la diversaj terminoj, pri kiu iom helpis A. Wandel k.a.

MOS akceptis la Esperanto-vortliston kiel aldonan kursmaterialon, ĉar ĝi faciligas kompreni la kurson. La kurso estas senpaga, alirebla por ĉiuj kaj riĉigas la medicinan terminaron en Esperanto. Kvankam temas pri profesinivela kurso pri la malsano KOVIM-19 kiu unuavice celas sanprofesiulojn, ĝi povas interesi ĉiun pro la

gravaj vivsavaj konsiloj rilate al la kontaĝa koronaviruso.

Tiurilate menciindas ankaŭ scienca prelego de Ite Tytgat “Kiel detekti la viruson?”, filmeto en YouTube kaj la literatura konkurso INK (limdato la 20-a de junio 2021) pri la temo “KOVIM-19: Kiel ĝi ŝanĝis nin?” (diskutrondo en YouTube, vidu apartan artikolon ĉi-numere). Por tiuj, kiuj aprezas aŭ bezonas oficialan agnoskon, eblas akiri oficialan atestilon de MOS post sukcesa finstudo de la kurso.

Aliru la kurson per jena adreso: mallonge.net/bo kaj tie sekvu la instrukciojn. Post registriĝo oni ricevas mesaĝon en la angla, kiu en Esperanto-traduko diras: “OpenWHO estas la unua MOS-platforno, kiu povas gastigi senliman kvanton da uzantoj dum sankrizoj. Ĝi provizas per rapida kaj senpaga maniero akiri la plej novajn sciencajn kaj praktikajn sciojn. Kun dinamika interfacio, alirebla per via komputilo kaj poŝtelefono”. La angla versio de tiu kurso havis meze de marto 2021 ĉ. 460 000 aliĝintojn.

Amri Wandel, Estrarano pri Scienca kaj Faka Agado de UEA — el revuo Esperanto (aprilo 2021)

La dua virtuala Malferma Tago de UEA kaj TEJO

Rezervu la daton: sabato 17-a aprilo 2021 — kaj ĉeestu la duan Virtualan Malferman Tagon de UEA kaj TEJO! La [unua Virtuala Malferma Tago \(aprilo 2020\)](#) estis inter la unuaj virtualaj eventoj postpandemie. Ĝi estis vere sukcesega kaj ĝuinda. Inter parolantoj por 2021 estis ankaŭ la LKK-anoj por Montrealo, kaj montrealanoj, same kiel reprezentantoj de UK-oj en 2021 (Belfasto — Irlando), 2023 (Torino — Italio) kaj eĉ 2024 (venu kaj eksci pli!). La organizantoj ankaŭ invitas ĉiujn aliĝi al la Telegram-grupo de UEA: uea.telegramo.org/. Tie eblos kunkomenti dum la tuta evento. Lerni pli: eventaservo.org/e/MT53 Venu kaj ĝuu! — Red.



Ne forgesu renovigi vian membrecon!

Ĉu vi sciis ke nun vi povas pagi vian membrokotizon al KEA rete? Vizitu la retejon esperanto.ca/index.php/membreco/

KEA proponas kelkajn specojn da membreco:

- Individua membreco kun Lumo retroŝte - Valida dum 2 jaroj: \$25
- Kunloĝanto de individua aŭ dumviva membro kun Lumo retroŝte — valida 2 jarojn — plenaĝulo (kun 18 jaroj aŭ pli): 15 \$
- Kunloĝanto de individua aŭ dumviva membro kun Lumo retroŝte — valida 2 jarojn — neplenaĝulo (kun malpli ol 18 jaroj): senpaga (Oni devas enmeti la naskiĝjaron supre por ĉi tiu speco de membreco.)
- Individua membreco kun Lumo retroŝte — valida 1 jaron — nepagipovulo: senpaga (legu kondiĉojn en la retejo de KEA)
- Dumviva membreco: \$400

Dankegon pro via subteno!

Stipendioj Marjorie Boulton

Esperantic Studies Foundation (ESF) anoncas sian ĉi-jaran konkurson por esplorstipendioj pri la historio, lingvistiko, sociologio, aŭ etnografio de Esperanto aŭ fenomenoj Esperanto-rilataj. Ankaŭ interfakan esploradon ESF bonvenigas kadre de la konkurso. La stipendioj honoras la memoron de Marjorie Boulton, fekunda aŭtoro de teatraĵoj, poemoj, kaj prozo en Esperanto kaj ankaŭ la ĉefa anglalingva biografo de Ludoviko Lazaro Zamenhof.

La stipendion oni povas utiligi samtempe kun aliaj premioj kaj stipendioj. Ĝi estas nerenovigebla. Ne ekzistas geografiaj limigoj; kandidatoj en kaj de ajna lando povas partopreni la konkurson. ESF estas neprofitcela organizaĵo, kiu alte taksas inkluzivadon kaj diversecon kaj ne diskriminacias surbaze de raso, koloro, lingvo, landa deveno, handikapo, religio, aĝo, seksa orientiĝo, aŭ genra esprimo.



Credit: Johnson & Alcock Literary Agency

ESF celas aljuĝi stipendiojn de po 10.000 USD en du kategorioj laŭ la esploristo: doktoriĝanta kaj doktoriĝinta. Vidu sube la plenajn postulojn.

Kategorio 1. Stipendio por la esplorado de doktoriĝanto, kiu jam komencis aŭ tuj komencos sian disertacion.

Kategorio 2. Stipendio por la esplorado de jama doktoro, kiu lastatempe doktoriĝis per sia disertacio kaj bezonas subtenon al ligitaj esploroj kaj eldonado.

Pliajn detalojn pri postuloj, kondiĉoj, kaj kandidatiĝoj oni povas trovi ĉe <https://www.esperantic.org/eo/stipendioj-marjorie-boulton/>

La limdato por kandidatiĝoj estas la 1-a de Junio 2021. ESF

celas anonci la stipendiitojn en julio 2021.

El Esperantic.org

Unesko-enketo per Esperanto!

La ĉefa celo de Unesko estas kontribui al paco kaj sekureco en la mondo per kunlaborado inter nacioj per edukado, scienco, kulturo kaj komunikado. Per tio oni antaŭenigas universalan respekton al justeco, al la regado de leĝo kaj al homaj rajtoj, fundamentaj liberecoj kaj toleremo, kiuj estas konfirmitaj por la popoloj de la mondo, sendepende de raso, sekso, lingvo, aŭ religio, laŭ la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj. Unesko ankaŭ kontribuas al daŭripova disvolviĝo kaj protektado de endanĝerigitaj lingvoj. Por evoluigi la realigon de la celoj, ekde 1971 ĝis 2015, Unesko trifoje publikigis serion de Tutmondaj Raportoj pri Edukado kaj planas publikigi la novan raporton *Futuroj de Edukado: Lerni fariĝi* (Futures of Education: Learning to Become) en novembro 2021. Por vaste kolekti ideojn kaj bone prepari la tutmondan raporton, Unesko fondis Internacian Komisionon pri Futura Edukado kun 17 altrangaj fakuloj el diversaj landoj, estratan de s-ino Sahle-Work Zewde, la Prezidento de la Federacia Demokrata Respubliko Etiopio. Unesko publikigis 1-minutan enketilon en 17 lingvoj, inkluzive Esperanton danke al la iniciato kaj traduko de Renato Corsetti.

UEA traktas tion kiel ŝancon por esperantistoj esprimi siajn opiniojn en la tutmonda raporto pri edukado. Tio estos grava ago laŭ la strategiaj planoj disvastigi la idealojn kaj valorojn de Unesko per Esperanto kaj por vidigi al Unesko la utilecon de nia lingvo. Ju pli multaj

esperantistoj plenigos la enketilon, des pli klare la lingva valoro estos videbla al Unesko. UEA do alvokas, ke ĉiu esperantisto investu unu minuton pleniĝi la facilan enketilon laŭ la indiko sur la retejo en.unesco.org/futuresofeducation/top-3-challenges-and-purposes-education/Esperanto aŭ mallonge: bit.ly/enketounesko2021. Ĉiuj Esperanto-organizoj, grupoj kaj kluboj dissendu anoncojn por instigi esperantistojn partopreni. La enketado finiĝos en la **fino de aprilo**.

Por doni nian kontribuon kaj influon al la Tutmonda Raporto de Unesko, UEA planas speciale sendi al Unesko proponan raporton, laŭ la indikoj de Unesko: *kiel edukado povas esti uzata por formi la futurojn de la homaro kaj la planedo: kio devas esti memorata kaj kio devas esti akcentita pri ĉi tiuj du aferoj*. UEA invitas talentajn esperantistojn sendi siajn proponojn al la dua vicprezidanto de UEA, Trezoro Huang Yinbao trezoro@qq.com kaj al la ĉefrepresentanto de UEA ĉe Unesko François Lo Giacomo francois@lojacomo.eu antaŭ la 20-a de aprilo 2021. La proponoj povas esti tre konkretaj aŭ ĝeneralaj. La fina propona raporto devas esti maksimume 1000 vortojn longa. *Atentu: Bonvolu nepre uzi komputilon por pleniĝi la demandaron, ĉar sur telefono foje ne aperas la fina butono "Sendu"*.

Gaz. Komuniko de UEA, aprilo 2021

Kanada Esperanto-Asocio

La estraranoj de KEA dum 2020–2021:

- Prezidanto: Paul Hopkins — Viktorio BC
- Vic-prezidanto: Geoffrey Greatrex — Otavo ON
- Kasisto: Raymond Brisebois — Londono ON
- Sekretario : Bob Williamson — Halifakso, NS
- Redaktoro: Vakas
- Estrarano: Yevgeniya (Ĵenja) Zvereva Amis — Montrealo QC
- Estrarano: Jed Meltzer — Toronto ON
- Estrarano: Andrew (Andreo) Sly — Viktorio BK
- Estrarano: Tiffany Antopolski — Toronto ON
- Estrarano: Eric Demers (Eriko Demaro) — Londono ON

Adreso:

110 Grand Ave. 414, London, Ontario, N6C 1L8,
Kanado

Retejo: <https://esperanto.ca/>

Facebook: facebook.com/KanadaEsperantoAsocio

YouTube: [youtube.com/channel/
UCVBXZyk2N436ot4qlug-2ng](https://youtube.com/channel/UCVBXZyk2N436ot4qlug-2ng)

La Lumo

Redaktoro: Ĵenja Amis. **Provlegistoj kaj helpantoj:** Bob Williamson, Francisko Lorrain.

Renkontiĝoj en Kanado

Montrealo kaj Kebekio, [Parolu ni Esperante](#): la dua lundo kaj la lasta vendredo de la monato, 19:00 EDT

[Viktoria Kafejo de Esperanta Kulturo](#): ĉiusabate, 10:00 PDT

[Halifaksa Videkunveno](#): dimanĉe, 11:00 ADT

[Toronta Konversacio por Komencantoj](#): dimanĉe, 13:00 EDT

[Alberta Kunvenu!](#) marde, 19:00 MDT

[Otavo Konversacia rondo tutmonda](#): la lasta ĵaŭdo monate, 19:00 EDT

[Londono, Ontario](#): sabate je la 14-a horo EDT)

Vizitu Eventan Servon por ĉiuj detaloj!

<https://eventaservo.org/>

Pasporta Servo

Aliĝu tuj, se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ĉe vi : www.pasportaservo.org.

Vi povas ankaŭ kontakti Jed-on Meltzer <jedmeltzer@gmail.com>, kiu estas la peranto por Kanado.